

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk


Fondita 1952

Numero 3/4

Julio/Aŭgusto/Septembro 1983



35a IFEF-Kongreso en Ostendo/Belgio 4a ĝis 10a de Junio 1983



Ypern estis celo dum nia tuttaga
ekskurso la 10an de Junio.

Varikolora perlo – la 35a

Oostende gastigis la IFEF-Kongreson

Oni devas ja admiri la aŭdacon de la organizintoj, inviti tian kongreson je la dua juniosemajno '83 al la belga havenurbo Oostende. 435 kongresanojn el 19 landoj prezidanto Gießner salutis en la urba kulturpalaco, malfermante la 35an kongreson de IFEF. Unu plia perlo en konsiderinda nombro da malsimilaj renkontiĝoj: tiu brile radias ankoraŭ post jaroj, alia efikis ruĝeta, unu pli verda, sed tiu ĉi ŝajnis varikolora kun makuletoj. Sendube, malgraŭ la necesaj turismaj elementoj, la faka aspekto ĉi-foje estis ne-pretervidebla, la fakaj programeroj eĉ apenaŭ neglekteblaj. Sekvantaj linioj ne pretendas kompletecon, sed respogulas sole observojn, impresojn kaj konkludojn de simpla kongresano, do estas nur babilado prikongresa – koncede subjektiva – kiu volas kvazaŭ ilustrati kaj iom spici la nudajn oficialajn raportojn aperontajn.

Informado utila

Funebra flagado aŭguris nenion bonan al la alvenantoj. Ĝi ne koncernis la kongreson, sed ĝia motivo fakte ja iom malhelpis la publikan informadon kaj la gazetaran konferencon. Saman tagon, jaŭdon 2.6. do, en la sama urbo mortis la onklo Karlo de reĝo Baldueno kaj frato de eksreĝo Leopold II. Tamen la regiona gazetaro kaj radiostacio en pluraj artikoloj kaj unu sendaĵo aprezis IFEF-Kongreson kaj Internacian Lingvon, kiel oni povis legi sur la informtabulo, kiu ilin povis legi. En tia ĉi trilingva lando kun ne maloftaj politikaj diskutoj prolingvaj, kun ĉefsidejo de la Eŭropa Komuna Merkato, oni atendas certan komprenemon pri utilo kaj celo de neŭtrala lingvo.

Kongresa Bulteno, diligenta laboro de Elisabeth Ritterspach kaj ŝiaj helpantoj, sciigis akurate kaj detale ĉiun kongresan eventon. Vere utila publikaĵo por kongresanoj kaj raportantoj, memorigilo por ĉeestintoj kaj ampleksa informado al Esperanto-gazetoj: 4 Bultenoj kun sume 14 paĝoj da ofte nokta redaktado kaj multobligo.

La t.n. Kongresa Libro donis nur malmultajn informojn krom la kongres-programo. La estro de la Fakprelega Komisiono prave kritikis, cetere ne la unuan fojon, ke i.a. la faka programo ne trovis respektivan konsideron. Volonte oni estus leginta ankaŭ iom pri loko kaj ĉirkaŭo, funkcio, ekonomio, topografio, arto kaj historio; ekzemple pri James Ensor 1860 – 1949, la plej fama belga ekspresionisto, civitano de Oostende de

lulilo ĝis la tombo. Grandan nombron de liaj pentraĵoj montras la galerio en ĝuste nia kongresejo, la urba fest- kaj kultur-palaco. Aŭtoroj de kongreslibro konscii, ke ĝin la kongresano volas hejmenporti kiel memoraĵon.

Alia informa branĉo provizore stagnas kun demisio de la ĝistiama komisiito, ne, ĉar tiu ĉi ne estas taŭga persono, kiel li mem esprimis tion, kaj same ne sole, ke ne troviĝis kunlaborantoj, sed simple pro absoluta manko de difinita koncepto flanke de IFEF. Kiu memoras la instalon de la informa fako (ĉu en Regensburg?), ĝi okazis iom arbitre: la taskoj venos kun la laboro. Ĝi ne evoluis, ĉar apenaŭ iu sciis, kiel kontribui. Domaĝe pro bona ideo!

Reprezentaj solenaĵoj

Preskaŭ 200 gekongresanoj partoprenis la ekumenan diservon. Ĝin celebris pastro Beckers kaj Jeli Koopmans, kiu i.a. eksplicis la konatan biblian legendon pri la babela ĥaoso; ĝi ja vere ĉiutage permanente ripetiĝas en sennombraj miskomprenoj, pro nescio aŭ lingva imperiismo. Barbara Kohl per sia belsona soprano kontribuis al la solenaĵo en la ĉefpreĝejo St. Petro kaj Paŭlo.

Dimanĉon matene, akurate kun la kutima malfruo, la kongresanoj aperis en la festsalono, por inaŭguri la 35an kongreson. Lucien De Sutter, prezidanto de BEFA, ĉefkomitatano kaj estro de LKK, per kelkaj sobraj vortoj komprenigis la multnombrajn malfacilaĵojn, ĝis: „Tamen la kongreso okazas!“

Unua en la vico de eminentaj gastoj estis la ĝenerala direktoro de la Belgaj Fervojoj (SNCB), Emanuel Flachet. Li parolis en la du ĉefaj belgaj lingvoj pri familia tradicio, la spirito de kamaradeco inter fervojistoj, respektive menciis nian laboron pri la UIC-leksikono kaj salutis en Esperanto.

Ĝenerala prezidanto de FISAIC, Gilbert Schmit el Luksemburgio, diris siajn salutvortojn komplete en bona Esperanto. Li pripensis, ke en la internacia jaro de komunikado radio- kaj televido-programoj facile sendiĝas trans geografiajn limojn, sed multe da homoj komprenas nur muzikon kaj bildojn. Akcelu ni fervojistaj esperantistoj la interkompreniĝon precipe en nia medio.

Ankaŭ urbestro Goekint parolis en klara Esperanto: „Necesegaj ĝenerala internacia komunikilo en la tempo de rapida aviadilo!“ Lin imponas, ke li kapablas paroli en unu lingvo kaj seninterprete estas komprenata de tiom da diverslingvanoj el 19 landoj.

Gregoire Maertens, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, ĝuis esti inter amikoj, sen respondeco, nur kiel gasto. Li parolis pri planoj, kiel inde festi la jubilean jaron 1987 kaj klarigis la specifajn taskojn de la tutmondaj UEA-filioj. Pri niaj ŝancoj en Eŭropo li desegnis optimisman bildon: „La Eŭropa Komunumo ne havas alternativon!“

Sinjoro De Monty, prezidanto de la Belga Esperanto-Federacio, finis la vicon de la gastparolantoj. Sekvis la salutvortoj de reprezentantoj el 15 landaj asocioj:

Leopold Patek — Aŭstrio;
Petro Harvey — Britio;
Marin Marinov — Bulgario;
Gunnar Thuesen — Danlando;
Josette Vonay — Francio;
Willy Grass — Germanio;
Nils Gösta Narvala — Finnlando;
Ramon Gimenez — Hispanio;
Janos Patay — Hungario;
Germano Gimelli — Italio;
Milivoj Marašević — Jugoslavio;
Jan Bultman — Nederlando;
Per Johan Krogstie — Norvegio;
Evert Rausek — Svedio;
Alfred Hunziker — Svislando.

Barbara Kohl kadumis la inaŭguran programon, kantis el sia repertuaro tre malsamajn verkojn kun same sentimentala lerto: Mozart, Porter, Siegel, flustris pri amo, ariis Kerubino el la Nupto de Figaro.

Fine prezidanto Gießner ekparolis tre impresive pri komunikado kaj lingva diskriminacio, humana kaj ekonomia solvo de tiu problemo. Samtrake li vidas la baraktadon kontraŭ ekologia kolapso de nia vivareo kaj la milit-minacon. „La fino de nia ekzistado estas kalkulebla, se ni ne ŝanĝos nian pensmanieron!“ Post tiuj pripensindaj vortoj li deklaris la 35an IFEF-Kongreson malfermita.

La sekvan lundon urbestro J. Goekint reciprokis la inviton. Li kaj kvar skabenoj, ĉiuj kun tradiciaj skarpaj zonoj, akceptis kongresdelegacion en la festa geedziga salonego de la moderna urbdomo de Oostende. Post interŝanĝo de afablaj komplimentoj kaj transdono de gastdonaco el la mano de prezidanto Gießner, urbestro Goekint regalis la vizitantojn per aperitivo kaj, bona ŝparema mastro de sia komunumo, per vasta rigardo de la urbestra balkono sur la sune orumitan urbon.

Turismaj eventoj

Bonvenaj okazoj por interlabora malstreĉiĝo, por flegi amikajn kontaktojn kaj ne laste por ekscii iom pri la kongreslando kaj ĝia loĝantoj, estas ĉiam la kongresaj ekskursoj. Kiel ajn ni akcentas la fakan esencon, turismaj aranĝoj restas nemankipovaj programeroj. La ĉi-kongresaj organizantoj eĉ sukcesis kunigi tiujn du elementojn en la duontaga ekskurso al Blankenberge kaj Zeebrugge, kie la objekto de la ĉefa fakpreleĝo estis reale kaj praktike spertebla.

Gvidado tra Oostende okazis dimanĉon en dufoje du grupoj, ankoraŭ tro grandaj por plene profiti tian promenadon, kvankam ĉiu jam antaŭe ricevis tripaĝan gvidilon. Tamen necesis streĉi fantazion por imagi, kie estis la iama urborando, kie la unua stacidomo, la antikva remparo, kie tiu aŭ tiu ĉi domo estis. Ne nur militoj, incendioj, inundoj kulpas, ke apenaŭ restis konstruaĵoj el fruaj epokoj. Ankaŭ diligentaj, negocemaj civitanoj mem kun plej alta aprobo neniam longe hezitis, forigi antikvajn domojn kaj

anstataŭ restaŭri, prefere nove konstruis. Plej lasta malbona ekzemplo prezentiĝas en la moderna Eŭropa Centro kun imponaj 104 metroj da alto, kiun devis cedi la komplete renovigita urba teatro el 1904, pri kio, se oni povas kredi la tekston, la Oostende-anoj tre malkontentas. Cetere malfacilas recenzi la gvidfoliojn; bombiĝantaj domoj, laboriloj de pasio k.s. certe estas tajperaroj.

Oostende kun 72 000 loĝantoj hodiaŭ primare estas industriurbo, komerca centro kaj trafiknodo kun granda fervojstacio kaj grava haveno. De ĉ. 80 jaroj, de kiam oni eltrovis la kuracan forton de la marakvo, ĝi estas ankaŭ monduma banloko kun kilometrojn longa fajnsabla plaĝo.

Sed kio estus Oostende sen Brugge? Al tiu Bruĝo do kondukis la lunda duontaga ekskurso por speciala trajno. Piede tra pitoreskaj kvartaloj, en fiakroj preter pentrinaj motivoj kaj per boatoj sur flore bordumitaj kanaloj la ekskursanoj konkeris la mezepoke aspektan urbokernon. Sed malgraŭ la frua sezono, evidente jam multegaj aliaj grupoj kaj individuoj havis la saman ideon. Kaj Bruĝo zorge flegas sian turisman famon.

La lasta kongrestago estis rezervita, por iom konatiĝi kun la kongreslando. Aŭtobusoj veturigis la kongresanojn tra kvietaj pejzaĝoj de okcidenta Flandrio al pluraj vidindaĵoj en Veurne, Jeper, Bellewaerde kaj Kortrijk. Kiel ĉiam dumvojaĝe inter geamikoj, vigla babilado rapide pasigis ankaŭ tiun lastan tagon.

Fervojfaka aspekto

Oni devas tre esperi, ke la fervojfaka esenco, kiu tiel ĝojige dominis en tiu ĉi kongreso, trovas ankaŭ respektivan eŝon en la multaj raportoj prikongresaj, ankaŭ aŭ precipe en la nacilingvaj, tiel dokumentante la seriojecon de faka laboro kaj la specifan flekseblecon de nia lingvo.

La fakaj komisionoj diligentas iomete ekster publika konscio. Fakprelega Komisiono evoluigis sisteme la sciigon de fakaj novaĵoj „Aktualaĵoj el via lando“, raportitaj de diversaj landaj asocioj. Terminara Komisiono eĉ tiel progresis, ke necesas jam diskuti leksikografiajn demandojn. Veraj obstakloj estis nur lokaj;

interesitaj personoj ne ĉiam ĝustatempe trovis la ĝustan hotelon aŭ salonon de kunvenoj.

„La rolo de la fervojo en la haveno de Zeebrugge“ estis la temo de la ĉefa fakprelego merkedron posttagmeze (legu resumon aliloke). Ĝin aŭdis ĉ. 160 personoj, inkluzive dormantojn, en tro varma, ne bone aerumita filmsalono de la kongresejo. Tre ĝenis la nedisciplina iro-kaj-veno. Kiu post ilustrita enkonduko de Gernot Ritterspach povis aŭskulti la ne tro verve prezentitan prelegotekston, tiu aŭdis interesajn detalojn. Antaŭa ekskurso al tiu ĉi havenstacio kaj filmo samtema faciligis klarigi la traktaĵon. La transmara trafiko, precipe tiu al Anglio, tiel perfektigis, ke ankaŭ laiko pri tiu faka branĉo povas kompreni la ĉiam denovan rezistadon kontraŭ la submara kanalo inter Francio kaj Anglio. Menciindan reflekson en diskutoj trovis la prelegotoj pri fervojaj novaĵoj, parte akopanataj de diapozitivaj, kun naŭ kontribuoj el ok landoj.

La ĵaŭdan faktemon verkis kaj prelegis Per Engen, vicprezidanto de IFEF. Li prezentis „Kelkajn pensojn pri stato de la fervojoj kaj de Esperanto kiel faklingvo.“ Skizante historie kaj aktuale la evoluon de la fervojoj, teknikan, ekonomian, personaran, li konkludas, ke IFEF havas ankoraŭ ŝancojn, plugi kampojn nekulturitajn. Kaj la unuaj kontaktoj al Ĉinio pravigas lin. La teksto en leginda broŝuro estas ricevebla ĉe IFEF.

Muziko kaj nostalgio

Laŭ la abundo de melodiaj prezentoj, tio estis tre gaja kongreso. Da muziko ne estis manko: solena aŭ militista, moderna aŭ laŭta, profesia kaj amatora, muza kaj amuza, almenaŭ por la muzikistoj; ĉies gusto trovis kontentigon. Domaĝe pro la kantistino Tiana Moons, kiu dum la interkona vespero klopodis aŭdigi melodiojn de Schubert, flandrajn kantojn, k. a. Sed la kantado apenaŭ ĝenis la vigan babiladon de la ĵus alvenintaj gastoj, kiuj ja ĝuste pro tio renkontiĝis ĉi tie.

La turisto, kiu fidis la urban semajno-programon, dimanĉon serĉis vane la fervojistan blavorkestron de Oostende en la muzik-pavilono de Wapen-placo. Ili preferis retiriĝi en la kongresejon, kie

ili tondre akceptis la inaŭgurajn gastojn, je ties ĉagreno kaj ies plezuro, antaŭ akustike ne taŭga fono de la ŝtuparejo. Sed ili havis vespere okazon, aŭdigi sin en pli taŭga ĉirkaŭo, kiam ili alterne kun la fervojista folklorgrupo de Oostende plenumis sian programon en la festsalono.

La kvarteto Nostalgio kaj Ramona van Dalsem plezurigis la kongresanojn lundon vespere per kantoj kaj skeĉoj. Ramona ĉiam ravas per siaj juneca voĉo, naiva ĉarmo kaj simplaj, nostalgiaj tekstoj.

La merkreda vespero vidis ŝvitantajn kongresanojn pli-malpli ritme moviĝantajn laŭ la viglaj melodioj de la diligenta balorkestro Dirty Band. La gajaj musikistoj en malfrua horo provis ankaŭ plurlingve kaj impetageste enscenigi kelkajn danc-ludojn, sed malgaje fiaskis pro lingva dilemo. Tio ne jam estis la lasta muzik-prezento. La Nacia Fervojista Orkestro koncertis ĵaŭdon vespere. Sed sendube la plej interesa koncerto estis la kariljona, ĉu plej bela, tio estas afero de individua gusto.

La sola profesia kariljonisto de Belgio, Petro De Smedt, sprite babile rakontis pri sia laboro kun la sonorilaro. Ĝi estas unu el la plej malnovaj profesioj, ne „la“ plej malnova, sed oni ne scias precize de kiam. Li klarigis teknikon, mekanismon, sonamplekson kaj ludeblojn de sia instrumento. La klavaro konsistas el bastonoj dratŝnure ligitaj al sonoril-marteloj. Luj foje diris, ke tio estis la plej interesa fakprelego. Li invitis la aŭskultantojn, dum la koncerto merkredon posttagmeze viziti lin en la turo de la kongresejo. Ĉiu povis mem observi, kiel per pugnoj kaj piedoj li laboregis por melki delikatajn ĝis tondrajn sonojn el la 49-sonorila instrumento. Eminentaj majstro de sia fako.

Organizaj necesoj

La atentinde granda partoprenado en la plenkursido pravigis la metodon, redukti la daŭron de nepublikaj kunsidoj favore al pli larga publika traktado de esencaj temoj. Rimarkigis la freŝa viva lingvo dum vigla diskutado. Organizaj kaj administraciaj demandoj, buĝeto, raportoj, kotizo estis rapide traktataj. Venontaj du kongresoj estos en Bulgario kaj Danlando.

La komitato laŭ propono de la fakaj komisionoj reelektis ties funkciulojn: estroj de terminara kaj fakprelega komisionoj, L. Sekereŝ kaj G. Thuesen; TK-redaktoro, H.D. Hartig. La motoro de la komisiono; sekretario por ambaŭ, G. Ritterspach, nesuperebla aso en ĉiuj faklingvaj demandoj. La historia komisiono pretigas broŝuron por 1984 okaze de la 75jara ekzisto de la fervojista faka movado. La koresponda servo ne kiel dezirinde fluas. La kongresrezolucio, ankoraŭ en Lugano tre diskutita pri neceso aŭ utilo, hodiaŭ estas jam ne malhavebla dokumento.

Kun la celo, fondi landan asocion, ekzistas kontakto kun ĉinaj fervojistoj kaj kun la redakcio de El Popola Ĉinio, kiu antaŭ nelonge denove presis fervojfakajn artikolojn. Dum la 68. UK en Budapeŝto IFEF-anoj multspece deĵoras kiel helpantoj. Por la fervojista tago, lundon la 1.8.83, oni planas tuttagan fakan programon.

La kongresproponoj havas ĉiam apartan rangon en la diskutado. Prudenta rekomendo venis de E. Kiefer. Li iniciatis enpreson de junulara adreso (GEJ) kaj klarigojn pri la TEJO-Pasporta-Servo en la plej novan reklamilon por la Inter-Rail-bileto, eldonitan de la germana fervojo DB. Bona ŝanco, ĉar ĵus ankaŭ la sveda fervojo SJ en sia porpasaĝera ilustrita gazeto Raka Sparet (rekta trako) publikigis unupaĝan artikolon pri Esperanto titolitan: Rekta Trako al Esperanto. Ĝi mencias same la internacian junularan organizon TEJO kaj klarigas la eblojn de ties Pasporta Servo. Se samtempe en ĉiu Inter-Rail-lando aperus simila publikaĵo, tio certe ne restus sen eĥo.

Alia propono ŝajnis unuavide neserioza, sed ĝi naskis almenaŭ komisiiton por studi la problemon de „krokodilismo“ kaj kolekti bonajn ideojn. Ĝi kaŭzis vastan diskuton, ne pri aprobo aŭ ne, sed pri la fakto, ke ja komencantoj ankaŭ volas, por lerni praktikadon, eĉ devas partopreni internaciajn manifestaciojn; kaj ĉu ne ofte eĉ en kongresoj oni bezonas helpantojn ne lingvospertajn? Certe la klasifikado laŭ grado de lingva kapableco ne estas taŭga solvo, tucerte ne kun samtempa indiko pri la devenlando. Kio estus, se unue ĉiuj funkciuloj, landaj kaj interaciaj,

modele klopodus pri korekta kaj konsekvenca aplikado de Esperanto? Aŭ se deĵorantoj en kongresoj ne cedus siajn ne tiel perfektajn kolegojn aŭ zorgantojn? Kial ne plu okazas kursoj dumkongresaj, ne nur por plenigi vakojn programajn? Ĉu ekzamenoj ne estas aranĝeblaj, unulingvaj kiel dum la UK en Antverpeno? GEFA havas ekzamenkomisionon.

La dilemo ja estas multe pli baza. Kiom da grupoj ankoraŭ regule kunvenas kun programo? En kiom da kunvenoj oni ankoraŭ rigore praktikas la Internacian Lingvon? Ĉiu individue povas fari multon, en sia propra medio, en sia familio, en sia klubo aŭ asocio. Morgaŭ ni komencos, eble! Ni pli bezonas praktikantojn, kiuj parolas, ol misiistojn kiuj predikas. wbr.

La lastaj du tagoj

Ĵaŭdon, la 9an de Junio, sufiĉe granda nombro de kongresanoj denove kolektiĝis en la granda salono por la dua plenkunsido. Kvankam la tagordo estis abunda, la IFEF-estraro sub la gvidado de sia sperta prezidanto Giessner traktis ĉiujn temojn en preskaŭ harmonia sfero, ĉu temis pri la budĝeto 1984 aŭ rilatoj al organizoj. IFEF estas konsiderata en UEA kiel unu el la plej aktivaj kaj grandaj fakorganizoj. Nome de la kvar skandinaviaj landoj la danaj gekolegoj invitis la 37an IFEF-kongreson al Vejle/Jutlando. La venontjara skisemajno okazos en Maria Alm (Aŭstrio) de la 28a de Januaro ĝis la 4a de Februaro.

La posttagmezo ofertis la duan fervojfakan prelegon antaŭ ne granda, sed atentema aŭskultantaro. S-ro Engen (Norvegio), la vicprezidanto de IFEF, lerte okupis sin per „Kelkaj pensoj pri la stato de la fervojoj kaj de Esperanto kiel fervoja faklingvo“. Li taksis pozitive la estontan evoluon de la fervojoj en la mondo kaj konkludis el tio optimismajn ŝancojn por la praktika uzo de la Internacia Lingvo. Aktualajtoj pri diversaj fervojoj kompletigis tiun interesan prelegon. GEFA-ano Ritterspach donis informojn pri la nova Rejngold-ekspreso, pri la plua evoluo de la magnetglita trajno kaj pri kabloj kun optikaj fibroj ĉe la fervojo.

Preskaŭ ne kaptis la sama salonego ĉiujn spektantojn de la sekvaj filmoj produktitaj kaj prezentitaj per sia verkinto Happy

(Francio). Temis pri la lasta IFEF-kongreso en Balatonfüred (Hungario) kaj la tiujara skisemajno en Bayrisch Eisenstein. Multaj kongresanoj rekonis sin en diversaj scenoj. Ankaŭ la LKK de la venontjara IFEF-kongreso klopodis per esperantigita filmo interesigi pri la bulgara kongresloko.

La vespero kunigis la kongresanojn al grandioza koncerto. Kun verve kaj kapableco la fervojista simfonia orkestro de la belgaj fervojoj ludis verkojn de konataj komponistoj el la lasta kaj nuna jarcento. Nur malvolonte la muzikantoj adiaŭis forte aplaŭdinte, ĉar la gekolegoj devis ankoraŭ atingi sian hejmon tiun vesperon.

Rapide alproksimiĝis la vendredo, la 10a de Junio. Kelkaj gekolegoj bedaŭrinde jam estis forvojaĝintaj, sed ĉiuj aliaj frekventis la aŭtobusojn, kiuj startis ekde la kongresejo. „Tra flandriaj historio-riĉaj urboj“ titoliĝis tiu tuttaga ekskurso, kaj fakte ĝi meritis tiun signifon. Dum la suno preskaŭ ĉiam brilis, la aŭtobusoj preterpasis beleantajn vilaĝojn aŭ hotelojn laŭlonge de la maro kaj ankaŭ la konatan tramlinion inter la nederlanda kaj franca landlimoj.

Poperinge kaj Veurne kun siaj historiaj urbokerno estis la unuaj celoj. Bedaŭrinde la kongresanoj devis rapidi por rigardi dum mallonga tempo almenaŭ la plej gravajn konstruaĵojn. Bonege organizita estis la tagmanĝo en la proksimeco de la sama mezepoka urbo leper. Rigardindaj estis la fasadoj de la gotika urbdomo kun ĝia alta belfrido kaj la katedralo. La laste vizita urbo estis Kortrijk, kie la urbestro kaj lokaj esperantistoj bonvenigis la jam iom lacajn kongresanojn en la Begina Domaro. Multaj vizitis la Esperanto-bibliotekon, la gotikan preĝejon aŭ la grandan merkaton, kies butikoj aparte allogis la inojn.

La reveturo en la vespera suno memorigis pri bildoj de flamaj pentristoj. Vastaj ebenaĵoj, interrompitaj de aleoj, bestogregoj kaj beletaj farmoj akompanis la vojon. Lastfoje kolektiĝis la kongresano. LKK-prezidanto De Sutter speciale laŭdis i. a. la GEFA-membrinon Elisabeth Ritterpach, kiu sukcesis aperigi kvarfoje la kongresan bultenon, kaj li dankis emocie al s-ino Elfriede Kruse, kiu streĉe subtenis LKK. IFEF-prezidanto Giessner

koncize priskribis la rezultojn de la finiĝanta kongreso kaj deklaris ĝin fermita. La IFEF-flagon transprenis nome de la bulgara LKK s-ro Marinov. Ankoraŭfoje sekvis kelkaj parte sentimentaj kantoj, antaŭ ol oni disiris. Al ĉiuj, kiuj

eblogis tiun bone sukcesintan 35an IFEF-Kongreson, estu tutkore dankate nome de la germanaj partoprenantoj. Ĝis revido dum la jubilea IFEF-Kongreso (12a ĝis 18a de Majo 1984) en Slânĉev Brjag apud Burgas (Bulgario).

W. B.

La rolo de la fervojo en la haveno de Zeebrugge

Resumo de prelego verkita en Esperanto de N. Vanspeybrouck

Ĉiun horon veturas trajno (18 en ĉiu direkto) de Brugge al Zeebrugge, kies pasaĝerstacio nun fariĝis finstacio de la linio, pro la plivastigaj laboroj en la haveno; novkonstruita branĉlinio kondukas al Heist-Knokke. Al la varstacio de Zeebrugge veturas 39 trajnoj ĉiutage por optimume priservi la havenon, kiun oni konstruis de 1896 ĝis 1907. Ĝiaj ĉefaj taskoj: importado de krudmaterialo kaj energidonaĵoj per pasaĝer- kaj frajt-transportado per vagon-pramŝipoj, per konternoj sur la Norda Maro kaj interkontinente, per konvenciaj kaj kombinitaj transportmetodoj ĉiuspecaj.

La regula pramŝip-trafiko komenciĝis en 1924 inter Zeebrugge kaj Harwich far de belgo-angla societo SBA; celoj de la vagonoj el Britio nuntempe estas F.R. Germanio (50%), Belgio (17%), Nederlando (10%), Aŭstrio (9%), Italio (7%) kaj Svislando (7%).

La kontener-trafiko inter Zeebrugge kaj Harwich komenciĝis en 1965. La kurt-distanca kontener-terminalo (SCT), inaŭgurita 1968, disponas pri 270 m longa kajo kun 2 pontarganoj, levpovo po 30 t. La transveturado daŭras 7 horojn, la malŝarĝado 5 horojn. Oni transportas precipe aŭtomobilpartojn inter la FORD-establoy en Belgio, Germanio kaj Britio; 84% de la konteneroj estas fervoje transportataj.

La transocena kontener-terminalo (OCZ) estas konstruita en 1971 kun 815 m longa kajo, 3 pontargantoj (levpovo po 45 t),

Die Rolle der Eisenbahn im Hafen von Zeebrügge

Resümee eines Esperanto-Vortrags, Verfasser N. Vanspeybrouck, Brügge

Jede Stunde, 18mal täglich in jeder Richtung, verkehrt ein Zug von Brügge nach Zeebrügge, wo der Personenbahnhof jetzt wegen der Arbeiten zur Hafenerweiterung die Endstation der Strecke wurde; eine neugebaute Zweigstrecke führt nach Heist-Knokke. Zum Güterbahnhof von Zeebrügge fahren täglich 39 Züge, um den 1896–1907 erbauten Hafen optimal zu bedienen. Seine Hauptaufgaben: Einfuhr von Rohstoffen und Energieträgern, Personen- und Güterverkehr mit Eisenbahnfähreschiffen, mit Containern über die Nordsee und interkontinental mit herkömmlichem und kombiniertem Verkehr jeder Art.

Den regelmäßigen Fährverkehr nahm 1924 die belgisch-englische Gesellschaft SBA zwischen Zeebrügge und Harwich auf; Ziel der Waggons aus Großbritannien ist heute die Bundesrepublik Deutschland (50%), Belgien (17%), die Niederlande (10%), Österreich (9%), Italien (7%) und die Schweiz (7%).

Mit dem Containerverkehr zwischen Zeebrügge und Harwich fing es 1965 an. Der Container-Terminal für Kurzstrecken (SCT), 1968 eingeweiht, verfügt über 270 m Kailänge und 2 Portalkräne mit je 30 t Hebekapazität. Die Überfahrt dauert 7 Stunden, das Löschen 5 Stunden. Befördert werden vorwiegend Autoteile zwischen den FORD-Niederlassungen in Belgien, Deutschland und Großbritannien; 84% der Container werden auf der Schiene befördert.

Der Transozean-Containerterminal (OCZ), 1971 gebaut, hat 815 m Kailänge und 3 Portalkräne (Hebekapazität je 45 t), die

etendiĝantaj 37 m super la akvo kaj 67 m super kvar trakoj. Sur ili oni povas telekomande manovri la vagonojn por pretigi trajnojn. Importaĵoj estas precipe frostigitaj nutraĵoj, elektraĵoj, lano, feloj, fruktoj (freŝaj kaj konservitaj), asbesto, tabako kaj ornamaj plantoj.

Por kombinitaj transportoj fervojo/ŝoseo oni aplikas kaj la horizontalan ŝarĝmetodon (Ro-Ro, Huckepack, kangurao) kaj la vertikalan (tutaj kamionoj, interŝanĝeblaj kamion-kestoĵ).

Destinhavenoj por la regulaj ĉiutagaj varkaj pasaĝerservoj trans la Nordan Maron estas Harwich (2-3x), Dover (10-12x), Felixstowe (3x) kaj Hull (1x).

Transportoj por la loka industrio sin direktas ĉefe al la vitrofarejo GLAVERBEL, al la koaksfarejo CARCOKE kaj al la vardeponejoj de BORLIM. Malpli gravaj estas la fiŝtransportado kaj la pasaĝertrafiko. La dumtempa konstru-entrepreno ZEEBOUW-ZEEZAND zorgas pri la plivastigo de la haveno: necesos alveturigi 11,5 milionojn da tunoj da ŝtonoj, el kiuj 48 % alvenos per trajnoj kun po 55 vagonoj. La nunan kluzon (210 m longan) al la interna haveno anstataŭos nova, 500 m longa. La nova ekstera haveno etendiĝos ĝis 1750 m en la maron, la gajnota tereno havos areon de 350 hektaroj.

Ĉi tiuj plivastigaj laboroj estas por Belgio absolute necesaj, se ĝi volas per Zeebrugge konservi sian rangon inter la grandaj Nordmaraj havenoj.

37 m über das Wasser reichen und mit 67 m vier Gleise überspannen. Hier können die Güterwagen fernbedient rangiert und zu einem Zug zusammengestellt werden. Einfuhrgüter sind vor allem tiefgefrorene Lebensmittel, Elektrogeräte, Wolle, Felle, Obst (frisch und konserviert), Asbest, Tabak und Zierpflanzen.

Für den kombinierten Verkehr Schiene/Straße wird die horizontale Verladung (Ro-Ro, Huckepack) ebenso angewandt wie die vertikale (ganze Lkw, Wechselaufbauten).

Zielhäfen für die täglichen Güter- und Passagierdienste über die Nordsee sind Harwich (2-3x), Dover (10-12x), Felixstowe (3x) und Hull (1x).

Der Güterumschlag für die ortsansässige Industrie ist hauptsächlich bestimmt für das Glaswerk GLAVERBEL, für die Kokerei CARCOKE und für das Lagerunternehmen BORLIM. Von geringerer Bedeutung sind Fischtransport und Personenbeförderung. Das Bauunternehmen auf Zeit ZEEBOUW-ZEEZAND wurde für die Erweiterung des Hafens von Zeebrügge gegründet. Es gilt, 11,5 Millionen Tonnen Bruchsteine heranzuschaffen, 48 % davon sollen per Schiene in Zügen zu je 55 Waggons befördert werden. Die derzeitige 210 m lange Schleuse zum Innenhafen wird durch eine größere, 500 m lange ersetzt. Der neue Außenhafen wird sich 1750 m weit ins Meer hinaus erstrecken, das erschlossene Gebiet wird eine Fläche von 350 Hektar umfassen.

Diese Erweiterungsarbeiten sind absolut unverzichtbar für das Land Belgien, wenn es mit dem Hafen Zeebrügge seinen jetzigen Rang unter den großen Nordseehäfen halten will.

Rezolucio

La 35a Kongreso de la Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEFE) okazinta en Oostende (Belgio) kun 435 partoprenantoj el 19 landoj,

atenigas
atenigas, ke la Unuiĝintaj Nacioj proklamas la jaron 1983 „Internacia Jaro de Komunikado“,

Resolution

Der 35. Kongreß des Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Verbandes (IFEFE), der in Oostende (Belgien) mit 435 Teilnehmern aus 19 Ländern stattfand,

(origi)
macht darauf aufmerksam, daß die Vereinten Nationen das Jahr 1983 zum „Jahr der internationalen Verständigung“ erklärt haben,

proklamas
IFEFE (N. 4)

in derlei...
substrekas, ke la lingvo ĝenerale estas la ĉefkomunikilo, per kiu homoj kapablas interrilati kun homoj, kio tamen konsiderinde estas komplikigata pro la ekzisto de multaj diversaj lingvoj,

konstatas, ke multaj ŝtatoj kaj internaciaj organizoj same kiel fervojaj entreprenejoj, fervojistaj sindikatoj kaj aliaj fervojistaj organizoj praktikas la lingvan problemon laŭ egoismaj kaj diskriminaciaj principoj, kreante du kategoriojn de homoj: unu kiu rajtas uzi propran lingvon, kaj alian, kiu devas uzi lingvon fremdan al si, *kio*

rekomendas al ĉiuj internaciaj organizoj, por akceli la rektan komunikadon de homo al homo, apliki la milfoje elprovan internacian lingvon Esperanto, pro kio ili ne nur esence subtenus la iniciaton de la Unuiĝintaj Nacioj, sed kio krome donus al ili mem nesubtakseblajn ekonomiajn avantaĝojn,

deklaras, ke la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio pretas helpi en ĉiuj klopodoj por alproksimiĝi al la proponita celo.

Oostende, la 8an de Junio 1983

Giessner, prezidanto

Adreso de la IFEF-sekretariejo:

Otto Rösemann
Ringstr. 13 D
D-3067 Lindhorst

betont, daß die Sprache das wichtigste Verständigungsmittel ist, mit dem Menschen mit Menschen verkehren, was aber leider durch das Bestehen vieler verschiedener Sprachen beträchtlich erschwert *(wird), ist.*

stellt fest, daß viele Staaten und internationale Organisationen ebenso wie Eisenbahnverwaltungen, Eisenbahner-Gewerkschaften und andere Eisenbahner-Organisationen das Sprachenproblem nach egoistischen und diskriminierenden Grundsätzen praktizieren, indem sie zwei Kategorien von Menschen schaffen: die einen, die ihre eigene Sprache benutzen dürfen und die anderen, die ihnen fremde Sprachen gebrauchen müssen, *Unter-*

empfiehlt allen internationalen Organisationen, für die Förderung der direkten Verbindung von Mensch zu Mensch die tausendfach erprobte internationale Sprache Esperanto anzuwenden, womit sie nicht nur wesentlich die Anregung der Vereinten Nationen unterstützen würden, sondern was auch für sie selbst nicht zu unterschätzende wirtschaftliche Vorteile bringen würde,

erklärt, daß der Internationale Eisenbahner-Esperanto-Verband seine Unterstützung bei allen Bemühungen zusagt, die zur Annäherung an das vorgeschlagene Ziel führen.

Vorsitzender
Giessner

Anschrift des IFEF-Sekretariats:

Otto Rösemann
Ringstr. 13 D
D-3067 Lindhorst

Mitteilung des Vorstandes

Die Frühjahrszusammenkunft des Arbeitsausschusses mit den Bezirks- und Sonderbeauftragten fand am 9.4.1983 in Frankfurt/Main statt.

Der Vorsitzende gab bekannt, daß der HV des BSW die Mittel für das BULTENO erheblich gekürzt hat. Zur Kostenreduzie-

rung wurden Papiersorte sowie Auflagenhöhe geändert, Seitenzahl und Bildwiedergaben reduziert.

Die im Herbst 1982 in „Wir“ durchgeführte Werbung hat leider nicht den gewünschten Erfolg gehabt. Eine mehr Erfolg versprechende Werbung soll nun auf anderen Ebenen versucht werden.

Die Vorbereitungen für einen Fernlehrgang machen erfreuliche Fortschritte.

Die Berichterstattung über den nunmehr hinter uns liegenden 35. IFEF-Kongreß in Oostende wurde festgelegt. Als GEFA-Vertreter wurden die Kollegen Brandenburg Graß, Ritterspach, Schindler und Schrapp zur Teilnahme an den Sitzungen bestimmt. Die Kongreßvorschläge und Stellungnahmen wurden besprochen.

Das Seniorentreffen findet am 10.9.1983 in Hannover statt, die IFEF-Skiwoche 1984 vom 28. 1. — 4. 2. in Maria Alm (Österreich). Über beide Veranstaltungen wird in dieser Ausgabe besonders berichtet. Die Vorbereitungen für die diesjährige Jahresversammlung in Lüneburg sind zum großen Teil abgeschlossen. Zur Teilnahme werden alle Mitglieder und Freunde im In- und Ausland nochmals herzlich eingeladen.

Seniorentreffen

Anläßlich einer Tagung mit den Bezirksbeauftragten am 9. 4. in Frankfurt/Main wurde beschlossen, das diesjährige Seniorentreffen für Mitglieder der nördlichen und westlichen Bezirke bis einschl. Frankfurt

am 10. September 1983 in den Hauptbahnhofs-Gaststätten Hannover

durchzuführen. Eine besondere Einladung mit den erforderlichen Einzelheiten erfolgt rechtzeitig.

Ich bitte Sie, diesen Termin vorzumerken.

E. Kruse

Esperanto en radio

Okaze de sia sabata sendaĵo „Plezurigitte en la semajnfino“ la radiostacio Frankfurt/M intervjuis du membrojn de GEFA, s-inon Kruse kaj s-ron Barnickel. La 7an de Majo 1983 la du ges-anoj estis bonvenigataj jam esperantlĝve; poste ili respondis al la kutimaj demandoj kaj raportis pri siaj multnombraj kontaktoj pere de Esperanto. La aŭskultantoj aŭdis ankaŭ la popolkanton „Vizitante Regensburgon“. La intervjuantoj kuraĝe laŭtlegis esperantlingvan tekston kaj pruvis tia-

maniere, kiel facile oni povas uzi Esperanton antaŭ la mikrofono. Espereble multnombraj interesuloj havis la eblecon, kapti tiun konversacion. W.B.

IFES 1984

La venontjara 25a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno (IFES) okazos de la 28. 1. ĝis 4. 2. en Maria Alm (Aŭstrio) — Hotelo Hintermoos —.

Ĉiuj junaj kaj junrestantaj Esperantistoj, kiuj ŝatas la vintran sporton kaj vintran refreŝiĝon, estas kore invitataj.

Alĝiloj estas haveblaj ĉe la sekretario Joachim Schrapp, Schmittingheide 17 d, 4400 Münster (Westf) aŭ deĵorpoŝte ĉe BAmtm a. D. Schrapp, DB-Schule 440 Münster (Westf).

Voĉo pri AEC el Francio

Kiel ni povis legi en la organo de la franca IFEF-asocio (FFEA), „Esperanto-fervojisto“, tie evidente la rilatoj inter AEC (Asocio Eŭropa de Fervojistoj) iom plivigliĝas. Laŭ tiu raporto la prezidanto de la franca AEC-sekcio, ĉefa estro de la sudfranca stacio Sète, petis de FFEA cent aliĝilojn kaj mem tuj aliĝis al FFEA kun peto, lerni Esperanton helpe de koresponda kurso. Estas do paralela evoluo kiel ĝi jam komenciĝis ankaŭ en Germanio, ambaŭ kun la celo fine atingi, ke la Internacia Lingvo fariĝu laborlingvo en AEC. Same kiel la francaj kolegoj, ankaŭ ni subtenu ĉiujn klopodojn de AEC-membroj, se ili petas nian helpon eklerni Esperanton, ĉar ankaŭ ili ja celas internaciecon, kvankam nur en Eŭropo.

Cetere AEC laŭ nia scio havas landan sektion ankaŭ en Belgio kaj la plej fortan en Italio. **GEFA**

Neue Mitglieder

Wir begrüßen unsere neuen Freunde aus dem Bezirk Essen: Kemling, Gisela, Bochum 6; Ledebur, Jutta, Hattingen; Mell, Brigitte, T-Büro; Weinberg, Ursula, Oberhausen 11 und Wellendiek, Norbert, Essen 13.

Wir danken unserem Mitglied Rosita Weber aus Essen für diesen großartigen Erfolg. Unseren Neuen wünschen wir gute Zusammenarbeit und Erfolg beim Erlernen der Internationalen Sprache.



Achtung!

Kongreßteilnehmer Bulgarien!

Aufgrund einer Vereinbarung mit dem LKK des 36. IFEF-Kongresses in Sonnenstrand (Slantschev Brjag) bei Burgas (Bulgarien) bitten wir alle deutschen Teilnehmer, wie folgt zu verfahren:

1. Abweichend von Seite 1, Ziffer 1 und Seite 4, Ziffer 3) des Aliğilos überweisen Sie bitte den **Kongreßbeitrag (keine anderen Beträge)** in DM an GEFA, Konto 953729 bei Sparda-Bank Frankfurt/Main, BLZ 500 905 00 und senden das Aliğilo gleichzeitig an die Anschrift des LKK in Sofia. GEFA verständigt das LKK von der Einzahlung des Kongreßbeitrags. Als Umrechnungskurs gilt baw 1 Dollar = 2,70 DM, das sind also DM 75,60 bzw. 37,80 bzw. 91,80 bzw. 13,50 Sollte sich der Umrechnungskurs um mehr als 10 Dpf nach oben oder unten ändern, wären entsprechende Beträge zu überweisen.
2. Wer über das LKK ein Hotelzimmer bestellen will, verfährt weiter wie auf Seite 2 des Aliğilos vorgeschrieben.
3. GEFA plant, ähnlich wie 1968, einen gemeinsamen Flug sowie möglichst auch einen gemeinsamen Liegewagen nach Burgas zu organisieren. Geplant ist ein sehr preisgünstiger 14tägiger Aufenthalt (es sind auch ein- oder mehrwöchige

Buchungen möglich) und zwar Abflug Donnerstag vor dem Kongreß, Rückflug Donnerstag nach dem Kongreß mit Buchung über ein deutsches Reisebüro in einem dem Kongreß nahe gelegenen Hotel. In diesem Falle entfällt die Zimmerbestellung auf Seite 2 des Aliğilos. Der **diesjährige** Katalogpreis hierfür einschl. Flug beträgt je nach Hotelklasse in Zweibett- oder Einbettzimmern zwischen 820 und 1000 DM pro Person. Die Teilnehmer an diesem Flug hätten also auch Gelegenheit, den vom LKK angebotenen viertägigen Busausflug nach Istanbul mitzumachen (Sonnabend bis Dienstag nach dem Kongreß).

Der Liegewagen würde zu Beginn des Kongresses dort ankommen und nach Schluß zurückfahren.

Um einen Überblick über Interessenten für eine der beiden vorstehenden Möglichkeiten zu erhalten, bitten wir, die hierunter abgedruckte „**Voranmeldung**“ bis spätestens 31.10.1983 an eine der darin angegebenen Anschriften einzusenden. Genaueres wird rechtzeitig bekanntgegeben.

Alles weitere bitten wir dem Aliğilo zu entnehmen (wird noch verteilt).

GEFA

VORMERKUNG

(bis spätestens 31.10.1983 einsenden als EDS an BAmTm Rösemann – Bf 52 – 300 BD Hannover oder an Otto Rösemann, Ringstr. 14 D, 3067 Lindhorst)

Ich interessiere mich für den 14tägigen Hotelaufenthalt einschl. Flug.

Voraussichtlich würde ich ein

Einbett

Zweibett – Zimmer bestellen

ja nein

Ich interessiere mich für eine Fahrt im Liegewagen (..... Personen).

ja nein

Name: Vorname:

Dienst- / Privat - Anschrift:

Ort / Datum Unterschrift

(Bezahlung in harter Währung im Kongreß).



Nekrologoj

La 25an de Majo mortis en la 73a vivjaro la multjara membro de la grupo Hannover

BOAR a. D. Friedrich-Wilhelm Lüders
Hauptstr. 34, 3051 Haste.

Post trafikakcidento mortis la 15an de Aprilo la multjara membro el la iama distrikto Münster

Gerhard Bardenhorst

* 25. 4. 1902

kaj lia edzino Frieda Bardenhorst

* 1. 9. 1920

4460 Nordhorn-Klausheide, Moorbirkenweg 19.

Ili ĉiam restos en nia memoro.

Ni esprimas nian sinceran kondolencon al la paren caro.

GEFA

Berichte über Aktivitäten aus den Bezirken

Frankfurt/Main: Esperanto-Kurs

Am 11. 5. 1983 ging der Sprachkurs in Friedberg zu Ende, der nach der Jahresversammlung 1982 im Januar 83 begann. Die Teilnehmer trafen sich zu einem geselligen Abend bei frohem Gespräch. Zu erwähnen ist, daß sich unter den Teilnehmern drei Pädagogen befanden. (2 noch im Dienst befindliche Lehrkräfte und eine a. D.). Wir hoffen, daß sich weitere Interessenten melden.

Wie aus Berichten in der „Frankfurter Rundschau“ und in der „Wetterauer Zeitung“ hervorgeht, hat die Stadtbücherei Friedberg — nach der Jahresversammlung der Vereinigung Deutscher Eisenbahner-Esperantisten im BSW im Herbst vergangenen Jahres und nach Beginn eines Sprachkurses im Januar diesen Jahres — ihre Bibliothek mit Werken in und über Esperanto bereichert.

Nach der Liste der Neuerwerbungen (60/83) der Stadtbücherei stehen nunmehr Lehr- und Wörterbücher, Werke der Esperantologie und solche allgemeiner Information, auch Lesestoff für Anfänger zur Verfügung.

Korespondi deziras

polaj kolegoj kun la adreso:
Dom Kultury Koeljanza,
PL-42-600 Tarnowskie Gory (Pollando).

Köln / Schwelm:

La Esperanto-grupo montris ekspozicion ek de Majo ĝis fino de Julio en vitrino en la enirhalo de la distriktdomo.

Franca jarkunveno

La venonta jarkunveno de FFEA okazos la 11an ĝis 16an de Oktobro 1983 en Sevrier en la restadejo „Foyer Communautaire de Vacances“. La prezo en dupersona dormĉambro inkl. ĉiujn manĝaĵojn estas 108 Ffr. po tago kaj persono. La kunvenloko situas ĉe Ancecy, ĉirkaŭ 80 km sude de Genevo en ĉarma regiono. Informoj, ankaŭ pro diversaj ekskursoj, kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe Georges Mazaud, 322, avenue de la Châtre, F 36000 Chateautoux. Ni povas rekomendi la partoprenon post la GEFA-jarkunveno en Lüneburg.

Nia amiko Josef Weidacher, Schneefinkengeweg 11, 8000 München 82, serĉas informojn pri radioamatoroj fervojistaj, kiuj parolas Esperanto, ĉu en Germanio ĉu eksterlande por interkonsenti eksterlandajn radioamatorajn klubojn. Skribu al li, ankaŭ deĵorposte Fka kaj Ga München Ost, Betreuungsstelle.

Münster / Westf.

Am 1. 5. wurde die traditionelle Maiwanderung diesmal in und um Hilstrup durchgeführt. Die Wanderung führte durch Felder und Wälder der Davert, einer teilweise noch unberührten Landschaft über ca. 15 km nach Davensberg.

Ni petas pardonon

ke pro teknikaj kaŭzoj kaj malsano en la presejo tiu ĉi numero venas kun sufiĉe granda malfruiĝo en viajn manojn. Pro tio esceptokaze ne plu eblas, aperigi antaŭ la jarkunveno la venontan numeron. Tial tiu ĉi numero aperas sub ciferoj 3 kaj 4/83. Kiu ankoraŭ ne aliĝis al la 27a jarkunveno en Lüneburg, bonvolu senprokraste fari tion. Turnu vin al viaj distriktkomisiitoj, se vi ne havas aliĝilon. Relegu „BULTENO“ 2/83.

Redaktifino por n-ro 5/83

estos la 10an de Novembro 1983

